# EKO

Esperiga Komuniko

Subtene al la loka, landa, faka kaj regiona agado

## Enhavo


- Kelkaj prelegantoj en AMO 63 v
- Novaj ret-grupoj en UEA
- ILEI refreŝigas la universitatan agadon
- EKO ĉiam pretas diskonigi viajn novaĵojn



Redakcio: Stefan MacGill, Mirejo Grosjean.

EKO 2020-12 sendita el Budapeŝto la 13an de aprilo.


*Al: Komitato, sekcioj kaj aktivuloj de ILEI, Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en iuj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj. Pli ol 1500 ricevantoj.*

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de ILEI kaj UEA

# AMO 63 V – KELKAJ PREZENTANTOJ


Progresas tiom rapide, kiom eble, la programo de la 63a AMO-seminario, la unua por virtuala livero. Ĝi okazos lige kun la irana kongreso.

Jen la iranaj kontribuantoj:

- Ahmad Reza Mamdoohi: 'Kiel instrui Esperanton dum pandemio?'
- Hamzeh Shafiee: 'La aplikaĵoj por virtuala babilado'
- Ali Kousari: 'Kiel babili Esperante dum pandemio?'

Kontribuantoj el la cetera mondo kompilata.

- Mirejo Grosjean (dimanĉe): 'Limoj - en la ombro de migradoj kaj deviga izoliĝo.'
- Keyhan Saradpour: 'La rolo de UMEA en la nuntempo' (kunlabore kun d-ro Klawe)
- *Deko da pliaj kontribuantoj aktive kontaktataj kaj serĉataj.*



Ni aldonas la plejlastajn informojn pri la seminario, en kiu ĉiu ajn povos partopreni. Por kunlabori aŭ partopreni, nur sendu mesaĝon al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. La maksimumo estos 50 partoprenantoj.

Ĉiuj momente haveblaj informoj pri la seminario ĉe: http://aktivulo.net/eo/enhavo/amo-63-v-pere-de-irano (Ankaŭ alkroĉitaj).

# SOLVOJ POR LA TENADO DE KONTAKTOJ

Renato Corsetti komunikas la sekvon: La grupoj uea-membroj kaj landa-agado nun funkcias: uea-membroj@groups.io kaj esperanto-landa-agado@groups.io

Fernando Maia: mi invitas vin legi kaj aŭskulti la brilan kontribuon de Anna Löwenstein en la retejo de UEA, uea.facila:

https://uea.facila.org/artikoloj/lingvo/kiel-nomi-tiun-viruson/.

## ILEI ADAPTAS SIN – UNIVERSITATA LABORO

La ret-paĝo de ILEI pri la universitata agado estas ĝisdatigita. Tio okazis pro la intervenoj de la estrarano de ILEI pri tiu agado, Radojica Petrovic, kaj la paĝara prizorganto Jozefo Nemeth. Trovu ĝin ĉe:

https://www.ilei.info/agado/universitata_agado.php

vortoj: 190

## EKO PROPONAS AL ILEI DUMTEMPAN SIMBOLON:

Komplete privata propono de izolato.

========== vortoj: 190 ==========

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado. La prezento estas ĝisdata ĝis 2019/15. Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj, ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.





AMO 20 (Nepalo), AMO 23 (Turkio), AMO 24 (Odense), AMO 29 (Bunda, Tanzanio).



